

Numero: 230.
Julio 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Esperanto estas nia lingvo

Antaŭ nelonge mi ekmemoris pri mia iama maljuna amiko onklo Gyuri. Li vivis en la urbo Nagykanizsa.

Li jam estis maljuna, kiam mi ekkonis lin. Li estis de kapo ĝis plando esperantisto kaj li ne povis ekzisti sen Esperanto.

Li ege ŝatis oratori pri nia lingvo kaj varbi novajn membrojn por nia movado.

Vere multaj homoj pensis pri la onklo Gyuri, ke en lia cerbo io ne estas orde. Li ne estis frenezulo. Tion neniu asertis pri li. Tamen el ni kelkaj primokis lin.

Relative li estis bona homo, kaj li faris multon dum sia vivo por Esperanto.

Li ankaŭ verkis en la zamenhofa lingvo. Verdire en Esperantujo liaj verkaĵoj ne estas notitaj.

Malgraŭ tio, ke multaj homoj, eĉ ankaŭ geesperantistoj ridis pri li, mi ŝatis lin. Iam mi vizitis lin en lia hejmo. La onklo Gyuri tre ĝojis pro mia vizito kaj li bonkore gastigis min. Ni longe babiladis pri bagatelaĵoj, sed fine ĉiufoje la temo estis mem Esperanto.

Nin ambaŭ tre interesis la internacia lingvo, kaj volonte ni parolis pri ĝi. Ni revadis, ke alvenos tempo, kiam la homaro rekonas la gravecon de Esperanto, kaj ĝi disvastiĝos sur la tuta terglobo.

Bedaŭrinde nin, geesperantistojn oni priridas, kiel mian karan amikon onklon Gyuri.

Oni ne asertas pri ni, ke ni estas frenezuloj, sed estas kiuj diras, ke en nia cerbo io ne estas en ordo.

Jes nia lingvo bezonas tiun entuziasmon, kiun posedis la onklo Gyuri. Kiu ne havas entuziasmon, tiu baldaŭ forlasas la zamenhofan lingvon.

Estus laŭdirinde, se la entuziasmo de la onklo Gyuri translokiĝus en nian koron, kaj la estonton ni povus rigardi tiom optimisme, kiel li. Ni devas konvinki la homojn, ke Esperanto estas utila lingvo.

Se nin ne forlasos la entuziasmo kaj persisto, tiam Esperanto okupos indan lokon inter la lingvoj.

-Redaktano-



Dialogo

-Kion vi lernas?

-Lingvon.

-Kiun lingvon?

-Esperanton.

-Ĉu Esperanto estas lingvo?

-Jes. Onidire ĝi estas interesa lingvo.

-En kiu lando ĝi estas parolata?

-En la tuta mondo.

-Ĉu en la tuta mondo? Interese. Ankoraŭ mi ne aŭdis pri tiu lingvo, kiu estas parolata ĉie. Tia lingvo ne ekzistas.

-Ja mi lernas ĝin.

-Esperanto, Esperanto, ĉu ĝi estas lingvo? Mi ankoraŭ ne aŭdis homon parolantan ĉi lingvon. Montru al mi homon, kiu parolas ĝin.

-Jen mi estas tia homo.

-Sed vi ankoraŭ nur lernas Esperanton.

-Baldaŭ ankaŭ mi perfekte parolos ĝi kaj vi aŭdos homon parolantan.

-Ĉu ĝi estas uzebla lingvo?

-Ho, jes. Kiel la naciaj lingvoj. Per ĝi oni povas komuniki ĉie. Esperanto estas facile ellernebla, logika lingvo. Mi proponas al vi, lernu ĝin ankaŭ vi!

-Ĉu mi lernu Esperanton?

-Estus laŭdirinde, se vi sekvus mian ekzemplon.

-Mi ne scias. Mi timas, ke kun neniu mi povos komuniki per tiu ĉi artefarita lingvo. Mi timas de ĝi.

-Ne timu! Esperanto estas utila lingvo. Post kelkaj jardekoj la homaro rekonos ĝin, kaj vaste ĝi estos uzebla sur ĉiu tereno.

-Pri la lernado mi traktos kun miaj geamikoj. Inter ili estas kelkaj uloj, kiuj estas spertaj en tiu ĉi temo.

-Ĉu ili estas lingvistoj?

-Eble estas ankaŭ tia fakulo inter miaj geamikoj.

-Bone, demandu ilin. Mi estas scivola, kiel ili opinias pri Esperanto.

-Ankaŭ mi.

-Bonvolu promesi al mi, se ilia opinio estos pozitiva, vi komencos lerni tiun ĉi lingvon.

-Kompreneble. Mi lernos ĝin.

-Mi atendas vian decidon. Mi tre esperas, ke mi sukcesis konvinki vin.

-Tion ankoraŭ mi ne asertas. Mi scias pri Esperanto tre malmulte kaj ankoraŭ aliaj homoj hezitas. Vere multaj deziras komunan lingvon, kiun oni povas ellerni facile kaj rapide. Montru al la homo klaran spegulon pri via lingvo, kaj tiam eble oni baldaŭ amase komencos lerni ĝin.

-Ŝaŝa-

Kara knabineto

Ili tute hazarde renkontiĝis. Georgo enuante promenis en la urbo. Komence li rigardadis la montrofenestrojn, sed post iom da tempo la multe da vidindaĵoj tedis lin.

Li trinkis glason da biero, ĉar estis terure varmega. En la bierumejo estis nur kelkaj vagabundoj. Unue ili strange alrigardis lin, kiam li enpaŝis la ejon.

En la bierumejo estis duonobsкуро kaj la klimato malvarmeta post la ekstera varmego.

Li sidiĝis al proksima tablo staranta en la angulo. Georgo ne devis atendi longe, ĉar baldaŭ ekaperis ĉarma, juna kelnerino.

-Per kio mi povas servi al vi? – ŝi pepadis afable kaj gastame akceptis lin.

-Bonvolu glason da ĝlacia biero!

-Jes mi komprenis. Tuj mi alportos, sinjoro – diris la kelnerino, kaj ĵetis esperoplenan rigardon al Georgo.

En ŝia rigardo estis io. Tiam ankoraŭ li ne komprenis tion, kio estas tiu flamo en ŝiaj okuloj.

Preterirante la knabino ĉiufoje ekridetis al li, kvazaŭ tiuj rigardoj sugestus tion: atendu min!

Georgo pasigis tempon proksimume duonhoron en la bierumejo. Li ĝuste deziris foriri kaj li vokis la kelnerinon por pagi.

-Vi jam foriras? – ŝi demandis surpriziĝante – Ĉu vi ne deziras trinki ankoraŭ unu glason da biero?

En ŝia rigardo estis ia alloga kaj ĝi tute frenezigis Georgon. Li nur balbutis kaj fine diris:

-Bone, mi petas ankoraŭ unu glason da biero.

La kelnerino ekridetis kaj foriris.

Dume aliaj gastoj alvenis. Ili estis tre laŭtaj, precipe la maljunulo, kiu envenis laste.



Ili diskutadis pri bagatelaĵoj. Antaŭ ol la kelnerino estus alportita por Georgo la glason da biero ŝi iris al la novaj gastoj, kaj ŝi informiĝis, kion ili deziras konsumi.

Iliaj okuloj ofte renkontiĝis, kaj nun jam ŝi ekscitigis lin.

Se nun li foriros, tiam ne estos alia okazo por renkontiĝi kun la ĉarma kelnerino.

Baldaŭ ankaŭ la dua glaso da biero alvenis kaj li kuraĝe demandis:

-Kiam finiĝos via labortempo?

Ŝajne la virinon surprizis la demando, kaj iom ĝene respondis dume ŝi ordigis sian hararon:

-Post duonhoro finiĝos mia labortempo, se mia kolegino ne malfruiĝos, kiel hieraŭ. Kial vi demandis:

-Se vi konsentas, mi akompanos vin hejmen.

-Ĉu min? Kial? Apenaŭ ni konas unu la alian. Kion vi deziras de mi?

-Mi ne scias – balbutis Georgo – mi nur pensis, ke mi akompanos vin hejmen. Komprenble se vi permesos.

Al la virino plaĉis la ideo kaj ridetante diris:

-Se vi deziras. Sed sciu, mi loĝas malproksime en la antaŭurbo, kaj ĝenerale tien mi iras perpiede. Pardonu, sed mi estas vokita de gasto. Baldaŭ mi revenos.

Georgo estis kontenta. Li ankoraŭ neniam proponis al virino, ke li akompanas ŝin hejmen. Li tute ne sciis, kial fari tion. Eble tial, ĉar al li tre tre plaĉis la kelnerino. Ŝi efektive estis admirinda. Ŝia longa, blonda hararo kaj ŝiaj brilantaj, bluaj okuloj ĉarmis lin. Certe ankaŭ li ne estas indiferenta al ŝi, ĉar kiam ŝi nur preteriris lin, ĉiufoje ridetis al Georgo.



Li trinkis la bieron malrapide kaj per siaj okuloj li sekvis ĉiun movon de la kelnerino. Ŝi babilis afable kaj kare kun ĉiuj gastoj. Baldaŭ li mallaŭtigis ankaŭ la laŭtan kompanion, kiuj post la mendo babiladis silente.

Ŝia kolegino ne malfruiĝis. Ŝi alvenis ĝustatempe. El ĝi Georgo rimarkis nenion, ĉar subite apud la tablo ekaperis la kara kelnerino kaj ŝi diris:

-Mi estas preta. Ni ekiru!

-Sed ankoraŭ mi ne pagis – diris Georgo kaj volis eltiri la monujon el sia jako.

-Ĉio estas en ordo. Mi aranĝis vian fakturon. Sinjoro vi estis la gasto de la firmao.

-Ĉu?

-Jes – ŝi ekridetis denove kaj ŝi komencis iri al la pordo de la bierumejo – Tiu ĉi drinkejo apartenas al mia onklo. Ne faru problemon pro la du glasoj da biero.

Georgo povis diri nenion. Lin ege surprizis tiu ĉi kareco. Lia koro intense ekpulsis, ĉar suspektis, en lia vivo komenciĝis nova epoko. Tiu ĉi renkontiĝo ne estas nur simpla flirto. La sorto ne hazarde gvidis lin en tiun ĉi bierumejon. Li devis ekkoni tiun ĉi karan knabinon.

Li ĝojis, sed aliflanke iom li timis, kio okazos? Li ne deziris kaŭzi trompiĝon al ŝi.

Georgo feliĉe sekvis la kelnerinon kaj interesiĝante atendis la morgaŭon.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio



Vivo perdita de Clelia GUGLIELMINETTI

Iam, kvazaŭ vualo
de matena nebulo
envolvanta feliĉan malproksiman
insularon,
eblan por mi havenon en futuro.
Sed nun la posttagmeza fulmotondro
skuas, ŝiras, dishakas, furiozas.
Pluvbatataj fantomas la insuloj
en nigra nubodensoj,
nenio ol minacaj nudaj rifoj,
neatingeblaj formoj.
Kaj al aliaj
eble denove fariĝos haveno:
al mi, se ankaŭ tra gutantaj nuboj
de l' vespero briletos la sereno,
la feliĉaj insuloj,
espero senespera,
restos por ĉiam la vana fantomo
de tuta vivo.



Al la nacioj de Robert HAMERLING

elgermanigis Ernesto Jozefo GOERLICH

Aŭskultu min, diversaj vi popoloj,
portante la armilojn tra la mond',
nur vane nun rivalos viaj voloj,
labor' por vi ne restu en estont' --!
Ĉar en landar' per novaj artikoloj
fandiĝis unu familia rond':
ĝis nun nacia estis la afero,
per ni komencu komunuma ero!

Hodiaŭ ne ekzistas plu la baroj
de la montar', kaj flugas telegram'
trans kontinentoj kaj tra vastaj maroj
kaj unuigas filojn de Adam'.
Ĵurnaloj estas novaj venkantaraj --
sen cel' lumetas jen malsama flam' --
kunligis ili sentojn kaj kutimojn,
ĉu volas vi disŝiri la animojn?

Ni ĉiuj estas nun mondcivitanoj,
neniu, ho, da ni maljesu ĝin!
Nacioj lermis kiel la infanoj,
la unu de alia -- kreu min!
Kaj kion vi elprenis for el manoj
de la praavoj, ne plu lasos vin.
Ĉe la gepatroj estis edukado,
ĉe ni jam ennatura nur agado!

Scipovos verki ankaŭ en estonto,
nacioj vi, grandagojn faru vi! --
Se metas vi la kronon sur la fronto,
alian fronton jam ornamos ĝi!
Vi restos riĉaj, fortaj -- sur la monto
de la feliĉo -- vi, nacioj, vi!
Nur unu mankos ĉiujn vi egale:
ne verkos plu naci' originale!

Kaj vi aliaj, kiuj jam rapide
antaŭen iris al la mondkultur' --
nacioj, kiuj forte kaj solide
ne celon jen, ektrovis vojon nur,
egalas vi aliajn, kiuj fide
nun sekvis vin ilia per natur' --
ĉar vidu vi -- laŭ la ordon' de Dio,
ho, ne ekzistas ie finacio!

Vi ĉiuj rajtas vivi laŭ kutimo,
enskribu vin en libro de agad' --
la sankta leĝo kuŝas en animo,
malam' foriĝu post la batalad'.
Disŝiru ne, en signo de l' estimo
vi unuigu ilin per verkad' --
la celon de la monda historio
atingu nun nacio post nacio.

Ankoraŭ staras netuŝebla muro
de sanga malkompreno inter ni --
ankoraŭ staras Babilona turo,
rivaloj lingvoj estas ĉiuj vi!
Ankoraŭ for de la ĉielazuro
eterna pac' ne venos tien ĉi --
pro tio, aŭdu vi, malgraŭ fanfaroj
de la kultur' ni restis do barbaroj!

Por infanoj



Onklo Adalberto Malgranda papilio

Iam sur la vasta, flora kampo vivis malgranda papilio. Dum la tuta tago ĝi flugadis de floro al floro kaj feliĉe ĝi dancis kun siaj kunuloj.

Ĝi ne konis la maĝojon. La vivo estis tre bela sur la kampo.

Sed en iu tago terura afero okazis. Malbonaj homoj alvenis kun gigantaj retoj. Ili estis papiliokolektantoj. Ili starigis enfalujojn ĉie inter la arboj, arbustoj, eĉ ankaŭ sur la flora kampo.

Unue ĝi atente rigardis ilin, ĉar ĝi ankoraŭ ne renkontis homojn, kaj ne sciis, kiom malbonaj povas esti tiuj ĉi dupieduloj. Ĝi pensis, ke eble ili deziras ludi kun ĝi kaj aliaj papilioj, tial ili starigis la enfalujojn.

Plaĉis al ĝi la nova ludo. Ridante ĝi flugadis de floro al floro kaj ĝuis, kiel la homoj pelis ĝin per siaj strangaj iloj.

Longtempe ĝi sukcesis eviti la kaptilojn, kaj tio ege kolerigis la papiliokolektantojn.

Ĝi ne sciis, kion deziras la homoj. Kial ili pelas ilin? La tuta kuregado ne estas ludo. Kiun ili kaptis, tiu estis enmetita skatolon, de kie la malfeliĉa papilio ne povis liberiĝi.

La malgranda papilio ne antaŭvidis tion. Ĝi pensis, ke ĝi estas nur bona ludo..

La malgranda papilio ĝuis, ke oni peladas ĝin, kaj kiam ĝi sukcesis liberiĝi, ĉiufoje laŭte ridis pri la mallertaj homoj, kiuj kuradis tien kaj reen sur la flora kampo.

-Vi ne sukcesis kapti min – ĝi diris gaje al ili kaj ĝi flugis plu.

Ĝi pensis, ke ĉiam ĝi sukcesos saviĝi kaj ĝi evitos la kaptilon de la papiliokolektantoj.



Eble pro la troa aplombo la malgranda papilio ne atentis kaj ĝi ne rimarkis la proksimiĝantan kaptilon. En la sekva momento ankaŭ ĝi estis jam en la reto. La homo ekkriegis:

-Mi sukcesis kapti la plej belan papilion.

Komence ĝi ankoraŭ esperis, ke baldaŭ ĝi rerecevos sian liberecon. Sed ne, ĉar ankaŭ ĝi estis

enmetita en metaloskatolon, kie jam estis kolektitaj siaj kunuloj.

-Kiam oni liberigos nin? – ĝi demandis de la aliaj papilioj.

-Neniam – respondis amare iu – ni estos mortigitaj kaj nin oni ekspoziciigos, kiel bela vidindaĵo.

-Ba, ĉu mi devos morti?

-Jes, jes – diradis la aliaj – nia vivo finiĝis. Plurfoje ni ne vidos la karajn sunradiojn.

En tiu momento subite malfermiĝis la supro de la metaloskatolo. Unue ili pensis, ke oni kaptis novan papilion, sed nun la supro estis malfermita pli longe kaj baldaŭ ekaperis ĉe la truo la scivolemaj, blujaj okuloj de knabeto.

Ili ne sciis, kion li deziras. Certe li nur scivolemadas – ili pensis – li baldaŭ fermos la skatolon, kaj ene denove estos malhelo.

Ne tio okazis. La knabeto malgaje rigardis la papiliojn kaj fine elbuŝigis:

-Vi kompatinduloj, kial vi estas malliberigitaj? Ja vi ŝategas la liberecon. Mi liberigos vin.

La papilioj pensis, ke li nur serĉas. La plenkreskuloj plu pelis la liberajn papiliojn. Neniu atentis la knabeton.

Li larĝe malfermis la supron de la metaloskatolo kaj li diris al la papilioj:

-Elflugu rapide! Vi estas liberaj. La viaj estas ĉi flora kampo, kaj mi deziras, ke vi flugu tie ĉi ankaŭ morgaŭ, kiam mi venos tien ĉi por ludi kun miaj geamikoj.

Unue la papilioj ne volis kredi al la knabeto, sed fine je la signo de sia plej aĝa kunulo ili ĉiuj forflugis.

Kiam la homoj ekvidis la flugantajn, liberajn papiliojn, ili furioze kuregis al la metaloskatolo, sed jam ili ne povis malhelpi la liberiĝon. Ili kolereme riproĉis la knabeton:

-Friponulo, kion vi faris? Nun ĉiuj kolektitaj papilioj liberiĝis kaj forflugis. Ni vane laboris dum la tuta tago.

La knabeto nur ridetis kaj ĝojis, ke liaj etaj amikoj sukcesis liberiĝi kaj li savis la vivon de multaj papilioj.

Por la malgranda papilio tio estis bonega leciono, ke ĝi devas atenti pri la homo, ĉar inter ili estas malbonaj, vere ekzistas ankaŭ simpatiaj kaj bonkoraj, kiel la knabeto, sed utila esti singardema, se homoj alvenas al la flora kampo.

Ekde tio, se la malgranda papilio ekvidas homojn unue ĝi bone rigardas la alveninton, ĉu li estas inda ludi aŭ ne.

-Onklo Adalberto-



HUNGARAJ URBOJ



Budapeŝto nokte



Győr



Pécs



Zalaegerszeg



Debrecen



Szeged



Miskolc